


*Tanja:* Mi ŝatas kanti kaj ludi gitaron kaj krome fari sporton, ekzemple bovingon, sketadon, rulŝu-kuradon, trejnadon per elipsa trejnamaŝino kaj muskoltrejnado. Mi ankaŭ ŝatas aŭskulti radion kaj radiodramojn. Kaj mi ankaŭ kunlaboris ĉe la produktado de kelkaj radiodramoj. – Tanja kaj Andreas

### La Granda Konjunkcio de Jupitero kaj Saturno en Decembro 2020

... estis temo de prelego de astrofizikisto Amri Wandel en 2020-12-22 okazigita de Israela Virtuala Esperanto-Klubo per Zoom-konferenco. Ĝin mi ĉeestis. La smartfonfoton (maldekstre) mi faris en Rechtenfleth en 2020-12-25, do kvar tagojn post atingo de la plej malgranda distanco en projekcio surĉiela (t. e. konjunkcio). – Andreas



### Veranstaltungshinweise

Seit Dezember 2020 treffen sich aktive EGU-Mitglieder am 1. und 3. Donnerstag des Monats um 19:30 Uhr virtuell per Zoom. Angesichts der Pandemie-Situation wird erwogen, auch unsere Jahreshauptversammlung 2021 auf diese Weise stattfinden zu lassen; wir werden rechtzeitig informieren. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite entnommen werden; zeitnahe Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Weitere Veranstaltungen: <https://eventaservo.org>.

### Impressum:

*Zeitschrift:*  
*Erscheinungsweise:*  
*Netzseite:*  
*Herausgeber:*

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)  
dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,  
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>  
Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

*Information und Redaktion:*

Anne Höpken, Schulstr. 13a,  
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837;  
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368;  
Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044;  
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

*Bankverbindung:*

Raiffeisenbank Oldenburg eG,  
IBAN: DE26 2806 0228 1200 1600 00  
Kassenwartin: Dörte Bierkämper



**EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.**



# Esperanto Gazeto

N-ro 60

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2021

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>

### Übung 3 (Was bedeuten die Sätze?)

1. Karlo parolis kun Eva pri ŝia vojaĝo al siaj gepatroj.
2. Karlo parolis kun Eva pri sia vojaĝo al siaj gepatroj.
3. Karlo parolis kun Eva pri ŝia vojaĝo al liaj gepatroj.
4. Karlo parolis kun Eva pri lia vojaĝo al siaj gepatroj.
5. Karlo parolis kun Eva pri sia vojaĝo al ŝiaj gepatroj.

1. Karlo admiras sian fidon al sia kapablo.
2. Karlo admiras sian fidon al lia kapablo.
3. Karlo admiras lian fidon al sia kapablo.
4. Karlo admiras lian fidon al lia kapablo.



**Internet, 07.01.2021:** Per Zoom-Konferenz erläuterte unser Vereinsmitglied Franz Kruse beispielhafte Fälle, in denen die Fürwörter „si“, „sia“ oder andere zu verwenden sind. Eine wichtige Botschaft: Üben bringt einem nur dann etwas, wenn man die Regeln verstanden hat.

**Interreto, 7a de Januaro 2021:** Per Zoom-konferenco klarigis nia klubano Franz Kruse ekzemplajn okazojn, en kiuj la pronomoj "si", "sia" aŭ aliaj estas uzendaj. Unu grava mesaĝo: Ekzerci donas al oni profiton nur tiam, se oni estas kompreninta la regulojn.

## Enigmo

	1	2	3	4	5	
						<b>Horizontale</b>
1						<b>1:</b> juvelŝtono [sen finaĵo]; <b>2:</b> ceremonia seĝo [kun finaĵo de adjektivo]; <b>3:</b> taĉmento de soldatoj [kun finaĵoj de adjektivo kaj akuzativo]; <b>4:</b> maldroni [sen finaĵo]; <b>5:</b> surkovri per kalci-oksido.
2					6	<b>Vertikale</b>
3						<b>1:</b> postsigno de unu movo de skribilo [sen finaĵo]; <b>2:</b> havanta delikatan, agrablan odoron; <b>3:</b> brakseĝo [sen finaĵo]; <b>4:</b> estaĵo de id-naska sekso [sen finaĵo]; <b>5:</b> besto simila al bufo [sen finaĵo]; <b>6:</b> parto de cirklo [sen finaĵo]; <b>7:</b> pronomo.
4						
5						
Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de regno en la norda Afriko.						



*Chielarka kovr'  
Okazas super manovr'  
Shipa en ... Oktobr'.  
#hajko  
#Regenbogen-#Haiku  
Schönen Sonntag aus  
#Rechtenfleth*

Andreas via Twitter  
<https://jhau.de/h03>

## Intervjuo al Tanja Heidmann de Hamburga Esperanto-Asocio

*Esperanto Gazeto:* Saluton, Tanja! Kiam vi komencis lerni Esperanton?

*Tanja:* Unuafoje mi komencis lerni en 2000. Tiam mi havis korespond-amikon. Ŝi proponis al mi lerni Esperanton. Ŝi iĝis mia instruisto, kaj mi lernis per korespondado. Bedaŭrinde ŝi malsaniĝis post kelkaj monatoj, kaj tial la instruado devis ĉesi. En 2013 amiko, kiu estas blinda, kiel mi, atentigis min pri Hamburga Esperanto-Asocio, kaj mi denove komencis lerni.

*Esperanto Gazeto:* Vi ŝatas spekti filmojn kun aŭdpriskribo. Kio ĝenas vin ĉe filmoj, en kiuj handikapuloj ludas rolon?

*Tanja:* Longe estis tiel, ke handikapuloj estis prezentitaj, aŭ kiel stultuloj aŭ kiel lertuloj. Mi memoras ekzemple pri filmsceno, kie renversiĝas boato kun virino vidkapabla kaj virino blinda, kaj la blinda, kiu povas naĝi, savas la vidkapablan, kiu ne povas naĝi. Laŭ mi io tia estas for de la realaĵo. Sed intertempe filmoj iĝis pli realaj tiurilate.


*Esperanto Gazeto:* Kion vi faras en via Esperanto-aktivado?

*Tanja:* Amiko mia havis la ideon okazigi regulan telefonkonferencon en Esperanto kun pluraj homoj. Tiun ideon mi efektivigis en Majo 2020. La konferenco okazas per ordinara telefona konekto – oni do ne bezonas iun specialan apon. La serio de tiaj telefonkonferencoj ankoraŭ ne finiĝis. Kaj ion tian mi ne nepre estus esper-atendinta komence.

*Esperanto Gazeto:* Kiujn apojn vi uzas por Esperanto?

*Tanja:* Mi uzas interalie Amikumu, Viber, WhatsApp kaj Google Translate. Ilin mi uzas kombine kun VoiceOver, kiel ekranleg-apo, en mia iPhone. En Androida smartfono mi uzus TalkBack tiucele. En mia Vindozo komputilo mi uzas por tio NVDA ("NonVisual Desktop Access"). Por Vindozo ĝi estas la nura ekranleg-programo por ankaŭ Esperantlingvaj tekstoj.

*Esperanto Gazeto:* Profesie vi laboras, kiel telefonisto. Kaj kion vi ŝatas fari krom Esperanton en via libertempo?



*Tanja, sketante;  
foto: Glantz*